V-19169/15.1963

Año XV N.º 1 (136) ENERO-FEBRERO 1963

Boletin

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

LA XXIVª KONGRESO, EN BARCELONO

Barcelono, la bela mediteranea urbo, kie loĝas la plej densa samideanaro en Hispanujo, pretiĝas por efektivigi la XXIVn Kongreson de Esperanto. Ĉiu samideano devas peni por partopreni tian belan kaj allogan kunvenon, pri kies aranĝoj ni prezentas detalajn informojn en la interno.

RAPORTO DE INFORMOFICEJO DUM LA JARO 1962

Distingindaj samideanoj: tiun-ĉi fojon mi publikigas raporton pli longa ol kutime, kaj pli detala; fakte, tiu, kiun vi legos, ĉi sekve, estas la jarraporto, de mi sendita al la Informa Fako de U. E. A.

Jen la resuma tabelo de plej gravaj aferoj:

Nombro de artikoloj kaj informoj aperintaj en la gazetaro: 205. El ili, nur tri malfavoraj.

Prelegoj por neesperantista publiko, okazis, 19.

Ĉeestintoj: pli malpli, 1.500 personoj.

Radiostacioj disaŭdigis 25 informojn kaj prelegojn.

Estis aranĝitaj 5 ekspozicioj, kaj proksimume vizitis ilin 2.200 personoj.

Dum la jaro estis dissenditaj: 800 afiŝoj, 2.000 flugfolioj, 6.000 prospektoj kaj 5.000 informaj bultenoj; tiuj lastaj, eldonitaj de HEF.

La statistiko bedaŭrinde ne estas tre reala, ĉar al la demandaro pri informoj, sendita al 30 E-grupoj rilate la urba aŭ provinca laboro dum la antaŭa jaro, nur respondis 6 el ili, nome: Valencio, I. E.-Barcelona, Manresa, Moyá, kaj la Fervojista kaj Junulara-sekcio de HEF.

Pro tio, la ciferoj indikitaj en la resuma tabelo estas la minimuma, ĉar ni scias ke iuj grupoj-kiuj ne respondis-tamen efektivigis aranĝojn. Vere, en nia lando mankas, iagrade, konscio pri tio ke: komuna laboro kaj koncerna informado, al centraj oficejoj, estas tre necesa kaj utila por la divastigado de nia Lingvo Internacia.

Komparante la rezultojn de la jaro 1962 kun tiuj de la jaro 1961, oni konstatas klaran plialtigon de la informado; speciale, pri informoj kaj artikoloj aperintaj en la gazetaro, ĉar preskaŭ duobliĝis la cifero, kaj ankaŭ en la disdonado de prospektoj, afiŝoj, ktp. Tamen ni devas konfesi, ke, koncerne agado pri gazetoj, la grupoj agis malmulte; fakte, nia Informoficejo sendis rekte. regulajn informilojn al la gazetoj kaj tio atingis veran sukceson. Ankaŭ, multe helpis al la sukceso, la gravega kaj serioza informado en la gazetoj de Valladolid, okaze de la XXIII^a H. K. de Esperanto.

Nome de Informoficejo ni dankas ĉiujn kunlaborantojn pro ilia helpo kaj sindonemo.

Samtempe, mi klarigas ke, pro la granda amaso da leteroj, kiun regule mi ricevas, estas preskaŭ neeble respondi al ĉiuj; tiel, do, mi petas vian senkulpigon. Plie, bonvolu skribi mallonge, kaj kun la ĝustaj informoj; ekzemple: se vi deziras sendi prospekton aŭ propagandilon al mi, pri nova E-kurso, bonvolu indiki en la prospekto la E-grupo kiu eldonis ĝin kaj ĝian eldonkvanton.

Ne estas utila por ni, kiel oni indikis en pasinta letero, scii ĉu la radiostacio de via urbo dissendis, aŭ ne, kelkajn informojn pri esperanto; estas nepre necese por ni scii kiom da informoj: du, tri aŭ dek.

Pri prelegoj kaj ekspozicioj, ni bezonas scii kiel eble plej ekzakte, kiom da personoj ĉeestis aŭ vizitis la menciitajn aranĝojn.

Kiel pruvite, la GAZETARO estis la plej taŭga informilo kaj, kompreneble, oni devas daŭrigi tian agadon eu tiu senco.

Esprimante, denove, dankojn al ĉiuj, nome al la S-ro Sekretario, R. Molera, ni restas je via dispono. Via:

S. ARAGAY

INFORMOFICEJO DE H. E. F.

Ni atentigas niajn legantojn kaj ĉiujn hispanajn samideadojn pri la nova adreso de la Informoficejo: Arce, 8-2.º-4ª. - CORNELLÁ (Barna). (Poŝtkesto nº 26).

(Ne forgesinte la lastan indikon, la Poŝtoficejo povas plirapidi).

OPERACIONES DE TESORERIA DE 1962

COBROS

Superávit del año 1961		13'849—	Pesetas
Cuotas	48.394'—		
Donativos	5.173'—		
Venta material y diplomas	713'—		
» Boletín extra	3.600'—		
Superávit Congreso de Valladolid	600'—		
Intereses en cuenta de ahorros	494'—	58.995—	72.844'—

PAGOS

BOLETIN:	Composición e impresión	29.855'—		
	Fotograbados	3.668'—		
	Sobres	1.255'—		
	Correo	5.156'—	39.934	
Sekretario-helpanto		6.000'—		
Impresos		2.445'—		
Material sobrante de Valladolid		994'—		
Cuota de U. E. A.		1.804'—		
Alquiler Archivo y Secretaría		1.200'—		
Varios y menores		776'—		
Renovación direcciones máquina		320'—		
Boletín extra propaganda		8.200'—		
Adresaro y sobres		6.145'—		
Ayuda a HEJS		1.000'—		
Ayuda a LIBROSERVO, déficit		3 225'—	32.109'—	72.043'—
Superávit final, pesetas				801'—

Valencia, 31 de Diciembre de 1961.
El Tesorero, *Ernesto Guillem*

COMENTARIO

Siguieudo nuestra costumbre de comparar estas cifras con las del año anterior, vemos que las cuotas y donativos son muy semejantes, y la pequeña disminución corresponde con el número de socios, también algo inferior. La venta de materia! ha sido muy baja, tal vez compensada por la venta del Boletín de Propaganda, y mayores los intereses en la cuenta de Ahorros. El superávit del Congreso de Valladolid merece especial agradecimiento, así como las cuotas de los Socios Colectivos de los Grupos, que han sido las normales.

Algo peor es el resultado de los pagos o gastos, pues como otras veces, han subido más que se esperaba, y la cifra que mejor se explica es la del correo, puesto que por el envío de los 6 ejemplares del Boletín, más el del Extraordinario de Propaganda, y la Adresaro, es forzoso gastar más. Los gastos generales se pueden considerar normales, y algunos de ellos son iguales o inferiores, salvo los últimos, de los cuales merecen párrafo aparte, los del Boletín Extra y la Adresaro, que se prometieron el año pasado, y en éste se han cumplimentado, bien que absorbiendo el superávit que había. Otros capítulos nuevos han sido la ayuda a la Organización Juvenil, que se viene efectuando en los demás países en diversas formas. La mala administración del servicio de librería no podía desembocor en otro resultado que no fuera en un déficit que, para facilitar su continuación, hemos tenido que hacer frente. Con ello dejamos muy saneado este servicio, esperándose ganancias para el año siguiente, que reanimen el presupuesto.

Lamentamos terminar con una nota pesimista, pero es forzoso comunicar que los gastos del Boletín, empezando por el de Diciembre que ya se pagó en Marzo, han subido el 25 °/o por efecto de la subida de jornales; por tanto, esperamos el detenido estudio de la nueva Directiva a este respecto, bien sea para disminuir el número de Boletines, o el número de páginas, o en fin, para proponer el aumento de las cuotas.

BARCELONA, CIUDAD DE LOS CONGRESOS

Acertadamente ha sido elegida Barcelona para sede del XXIV Congreso Español de Esperanto. El hecho en sí ya es altamente prometedor y preludio seductor para aquel que quiera conocer a fondo nuestra ciudad condal, la cual, gracias a su privilegiada situación mediterránea, constituye la meta para toda clase de inquietudes materiales, espirituales o simplemente turísticas.

La urbe catalana reúne condiciones especiales para dejar satísfecho al visitante más exigente. Sus diversas industrias, su ingente comercio, tanto interior como exterior, le dan un carácter altamente cosmopolita. Su afamada artesanía y sus múltiples manufacturas la convierten en el centro obligado de todo comprador deseoso de ser bien servido y complacido.

Por su proverbial cortesía, sabe captar rápidamente el interés y la amistad de cuantos se dignan visitarla. Además, la paz y la tranquilidad que en ella se respiran atraen a quienes desean pasar unas vacaciones agradables, exentas de preocupaciones, base primordial para el logro de la felicidad completa, si la palabra vale.

Desde Barcelona pueden realizarse las más interesantes excursiones a parajes de verdadero encanto natural. Enclavada en el centro de la región catalana y rodeada de una cadena de montañas de gracia y belleza geológicas, puede uno deplazarse, gracias a los rápidos medios de comunicación existentes en la actualidad, hacia lugares de verdadero ensueño. Las visitas efectuadas a Miramar, Montjuich, Tibidabo, Montserrat, Manresa, Vich, la Costa Brava y Mallorca, la isla maravillosa, habrán de dejar, por fuerza, huella imborrable y perdurable en el espíritu, ávido de hondas impresiones.

Si aspira al goce puro arquitectónico o artístico, encontrará en nuestra ciudad complacencia, ya que podrá recorrer el famoso Barrio Gótico, que colmará todas sus apetencias y también recrearse en las joyas que sobre la periferia barcelonesa se yerguen por doquier, tales como: El Templo Expiatorio de la Sagrada Familia, el Gran Teatro del Liceo, Teatro Griego, Palacio de la Música y otros muchos edificios de estilo clásico, barroco o moderno, que le causarán admiración. Y como broche de oro a tanta magnificencia, podrá extasiarse en la contemplación del extraordinario recinto de la Feria Oficial e Internacional de Muestras de Barcelona, cuya fama ha trascendido a todas partes y que consta de numerosos pabellones: Palacio de las Naciones, Palacio del Deporte y, por último, el soberbio Palacio Nacional, albergue de importantes Museos, y una grandiosa Sala de Conciertos que cuenta con un monumental órgano; todo ello, rodeado de hermosísimos jardines y fuentes luminosas, que dan mágico encanto a tanta maravilla.

Mención aparte merece la futura «Ciudad Universitaria», en la que, entre otras construcciones, destacan ya por su importancia la Facultad de Farmacia y la magnífica Facultad de Derecho, exponente precioso del estilo moderno, de gran capacidad y luminosidad, encuadrada entre bellísimos jardines. Ni que decir tiene, que la imprescindible visita al «Pueblo Español» ha de constituir la nota sobresaliente dentro del conjunto arquitectónico antes citado. Recorriéndolo sin prisas se obtiene una visión total que impresiona notablemente por el contraste original de las construcciones erigidas, verdadero mosaico del arte patrio, que subyuga y deleita.

Si la permanencia del visitante, sea nacional o extranjero, durante los días obligados del «Congreso Español de Esperanto» ha de contribuir a aquilatar el trabajo realizado a través de los tiempos por las generaciones que han ido sucediéndose y superándose constantemente, no podrá tampoco pasarle desapercibida la transformación que, a ritmo acelerado, va operándose en toda la ciudad condal. Este nuevo dinamismo e impulso vital, que el Excmo. Ayuntamiento da a las obras de mejora, embellecimiento y amplitud del área urbana, sobrecogerá al que sepa valorar adecuadamente el esfuerzo para convertir a Barcelona en una de las ciudades más hermosas del mundo, y, por antonomasia, en la «Ciudad de los Congresos», título que tiene bien merecido por su laboriosidad y singulares atractivos.

Por ello, la celebración del XXIV° Congreso Español de Esperanto en tan maravilloso marco, ha de tener, sin duda alguna, una resonancia nacional y extranjera, máxime cuando los objetivos específicos de este acontecimiento esperantista persiguen el mejoramiento de las relaciones humanas, sobre la base de un idioma universal, que permita el entendimiento sincero, fraterno y cristiano de todos los hombres sin prejuicios ni discriminaciones raciales de niguna clase. Ante estos postulados enunciados, esperamos la asistencia de todos los esperantistas para dar así, con su presencia, clara constancia de sus ideales de paz y hermandad, recordándoles, de paso, que Barcelona fué, es y será, siempre: ARCHIVO DE CORTESIA.

NUESTRA CIUDAD CONDAL OS AGUARDA PARA RECIBIROS Y AGASAJAROS!

Por la Comisión organizadora:
JAIME ARAKAY PUJOLS

NI RECENZAS

Delfí Dalmau. — Aclariments lingüistics.

Por tiuj kiuj kapablas kompreni katalunan lingvon, ĉi tiu libreto de nia elstara akademiano estas vera trezoro. En tre bela kaj preciza lingvo, Dalmau, vera poligloto kaj elstara lingvokomparanto, eksponas siajn opiniojn pri malracieco de naturaj lingvoj kaj pruvas, tre trafe, ke neniu el ili povas pretendi la regadon de la internaciaj rilatoj. Nur Esperanto rajtas esti tia, kaj la pledado de la aŭtoro estas, ne nur konvinka por la ĝenerala publiko, sed, plezuriga por ni, esperantistoj, ĉar li, per polurita kaj belstila kataluna lingvo, komprenigas tion al ĉiuj.

Nia didaktika amiko sukcesas tiel per belaj paroladoj kiel per trafaj libroj, en la defendo de Esperanto.

Ĉiokaze, la multenombraj legantoj de la librokolekto «Panorama actual de les idees» havos ekzaktan opinion pri la afero kiun ili alprenos en «Aclariments lingüistics», la nova pledado por Esperanto de nia laŭdinda amiko Dalmau.

La antaŭparolo de F. Canyameres estas inda alirejo al la valora verketo kiun ni rekomendas, varme, al ĉiuj kiuj kapablas kompreni la lingvon de Verdaguer.

R. HERRERO

H. C. Andersen.—« a Marvirineto».

La bela kaj famkonata fabelo de la senmorta dana verkisto estas nun prezentita, en luksa formo, de la eldonejo KOKO, el Kopenhago.

Forte kaj bele bindita. 75-paĝa, kun belaj ilustraĵoj de G. Hjortlund.

Per korekta kaj fundamenta Esperanto, la tradukinto prezentas al ni la moraligan kaj edukigan verkon de la bonegula Andersen, kaj ni povas ĝoji ke, de nun, la bretaro de ĉiuj esperantistoj povas montri ekzempleron pri kiu ni povas fieri, ne nur pro la literaturaĵo—pri kio mi ne devas emfazi - sed ankaŭ pro la formo, ĉar la vestaĵo estas inda je la interno.

La esperantista infanaro devas trinki idealon, moralon, menssanecon, kaj libro tia kia «La Marvirineto» estas taŭga fonto por tion havi. Kaj, ankaŭ, plenkreskuloj devas, de tempo al tempo, forlasi la seriozajn legaĵojn por infaniĝi, tio estas, por pliboniĝi kaj konsideri la mondajn aferojn de infaneca vidpunkto.

La tradukinto, inĝ° Ib Schleicher, zorge kaj ameme tradukis la fabelon, kiun li mem rakontis, plurfoje, al siaj infanoj, denaskaj esperantistoj.

CIRANO

XXIVª Hispana Kongreso de Esperanto

28ª ĝis 25ª de Julio 1963 — BARCELONO

PROGRAMO

Merkrede, 24.ª —Je la 5ª, posttagmeze, malfermo de la akceptejo kaj disdono de la kongresa dokumentaro. 10ª vespere: Interkonatiĝo en la Ciutadela Parko.

Ĵaŭde, 25.ª —9ª horo. Daŭrigo de la akceptado.

10ª horo. Sankta Meso, kun prediko en Esperanto, en la Katedralo.

12ª horo. Oficiala Inaŭguro de la kongreso en la Palaco de la Nacioj,

16ª horo. Malfermo de la 2ª H-J-E-K, Laborkunsido de HEJS.

18ª horo. Junulara balo.

19ª horo, Inaŭguro de la Esperanta Ekspozicio.

22ª horo. Koncerto de la Urba Muzikistaro kaj Folklora Festo.

Vendrede, 26ª —8ª horo. Matena ekskurso tra Montserrat kaj Vich; reveno je la 14ª horo.

17ª horo. Laborkunsido de HEF-estraro kaj delegitoj de ĉiuj E-grupoj.

19ª horo. Hispanlingva prelego.

Sabate, 27ª —9ª horo. Ekzamenoj al la esperantistaj lernantoj.

11ª horo. Teatra Prezentado.

13ª horo. Akcepto de la kongresistoj en la Urbodomo.

16ª horo. Junulara Oratora Konkurso.

17ª horo. Eŭropa Konferenco.

18ª horo. Ĝenerala Laborkunsido.

20ª horo. Esperantlingva prelego.

Dimanĉe, 28ª —11ª horo. Oficiala Fermo de la Kongreso.

14ª horo. Oficiala Bankedo.

LASTHORA SCIIGO

Finfine, la translokiĝo de la Federacio al Zaragoza estas akceptita de la Registaro.

Tuj kiam la proponita Estraro estos aprobita ni publikigos ĝin kaj ni sciigos la koncernajn adresojn, por ke la korespondado estu tien adresita.

EL LA LANDA MOVADO

Pasintan 26-an de Januaro okazis la Ĝenerala Kunveno de Esperanto-Liceo de Madrid.

Estis elektita nova Estraro, laŭ la ĵus aprobita regularo. Jen la novaj estraranoj:

Prezidanto, Sro. Santos B. Arranz.
Vicprezidanto, Sro. Miguel Manteca López.
Sekretario, Sro. Félix Gómez Martín.
Vicsekretario, Sro. Venancio Monsalve Cruz.
Kasisto, Sro. Manuel García Porras.
Kontisto, Sro. Fidel Losa Hernández.
Bibliotekisto, Sro. José M.ª González Aboin.
1.ª Voĉdonanto, Sro. Florencio Enfedaque Tremps.
2.ª Voĉdonanto, Sro. Gerardo Flores Martín.
3.ª Voĉdonanto, Fino. Paquita Iruegas del Río.
4.ª Voĉdonanto, Sro. Alberto de la Torre Lagunero.
5.ª Voĉdonanto, Sro. Fernando Gutiérrez Moreno.

MADRIDO.—«El Mundo Financiero», la grava porekonomia gazeto, direktita de nia kara sam.º José Luis Barceló (Pedro Tejeira, 5, 1.º B. Madrid-20), daŭre propagandas Esperanton kaj ofte aperigas trafajn artikolojn, kiuj multe favorigas nian ideon. Ni dankas kaj esperas ke la propagando fariĝos pli kaj pli ofta kaj efika.

«Portavoz de la Economía y de las Finanzas», grava gazeto pri la sama fako. direktita de Srº Francisko Alvarez Cosmen (Plaza de Santiago, 2, Madrid), ankaŭ publikas favorajn artikolojn pri Esperanto, pro kio ni sincere dankas.

CÓRDOBA.—Nia kara samideano Diego Ruiz Herrero, Sekretario de la Diplomitaj Inĝenieroj en la urbo de la Kalifoj, tre vigle laboras por Esperanto,

Ĉu ni povos, en baldaŭa jaro, efektivigi kongreson en lia bela urbo? Se li bone persistas, la ideo povas iĝi realo!

VALENCIA. — Pro bedaŭrinda foriro de sam.º Vizcaíno al Barcelono, la kurso de la Universitato daŭras sub la gvidado de la kompetenta samº V. Martí Miñana, lerta poligloto, kiu sukcesas interesigi la lernantaron kaj, plie, komencis novan kurson ĉe la Sindikata Domo.

Kiel en la pasinta jaro, okaze de la datreveno de la forpaso de la neforgesebla Ludoviko Hernández, multenombraj gesamideanoj kolektiĝis ĉe lia tombo. Post kelkaj sentemaj vortoj de sm.º R. Herrero, oni surmetis laŭrobranĉon sur la memortabulon de la kara forpasinto.

KONGRESA ALVOKO

Ĉiam, kiam alproksimiĝas la dato de venonta kongreso, tiel la Organiza Komitato kiel la Estraro de H. E. F. petas al la samideanaro, enlanda kaj eksterlanda, ilian helpon, ĉefe por amasa partopreno, kaj ne malpli, por aktiva vigligado de la laborkunsidoj.

Ĉifoje, denove, ni nin turnas al ĉiuj por ke, efektive, tiel estu. Por konsciaj samideanoj, nia venonta kongreso tion postulas; pro la graveco de la kataluna movado kaj ankaŭ pro la atento kiun donos al la kongreso la tieaj aŭtoritatuloj, kiuj povos dedukti, de la sukceso de nia kunveno, profitodonajn decidojn por nia movado. Ni esperas, do. ke ĉiuj hispanaj esperantistoj faru sian eblon, kaj iom pli, por sukcesigi la barcelonan kongreson.

Aliflanke, se ni konsideras ke, tiel Barcelona kiel ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, estas bunta kaleidoskopo de ravaj panoramoj, la turisma aspekto de la vizito al la kataluna ĉefurbo estas forta tento por ĉiuj vojaĝemuloj kaj por la familianoj kaj amikoj de niaj samideanoj, kiuj, pro tio, povas ŝveligi la kongresnombron kaj helpi por briligi la eksteran impreson pri la kongreso.

Alia fakto devas decidigi niajn amikojn. La nova Estraro de H. E. F. ekfunkcios okaze de la kongreso.

Ne nur kiel ĝentilaĵo al ĝi ni ĉiuj devas alkuri por kuraĝigi ilin, sed ankaŭ por aserti al ili pri nia kompleta kunsento kaj spirita samageco.

Pro ĉio, do, ni esperas ke ĉiuj faru tiamaniere ke la kongreso estu inda sekvo de ĝiaj antaŭantoj, pri kies memoro ni ĉiuj povas fieri.

Antaŭdanke, bonvolu akcepti la lastokazajn salutojn de

LA ESTRARO DE H. E. F.

GRAMATIKA KULTURO

Ni prenas de «Kulturaj Kajeroj», la ŝatinda franca revuo, la instruan artikolon de nia akademiano D. Dalmau. Ni esperas ke nia legantaro bone ĝuos legante kaj leginte ĝin, tiel pro la instruo kiel pro la plezuro, ĉar la aŭtoro plezurigas instruante.

I. — PREPOZICIO

Sen, kun, de, al, sur, sub,... estas prepozicioj, ĉu ne?

Jen du frazo kun sama, senco sama semantiko, sed malsama sintakso:

«Sen scii vian nomon, mi ne povas nomi vin».

«Ne sciante vian nomon, ni me povas nomi vin».

Ĉu vi pli ŝatas la unuan aŭ la duan? Kiun el ili vi konsideras pli korekta?— Ambaŭ ekzistas ĉe bonaj aŭtoroj, en bonaj verkoj—Sed, kiun vi preferas? Se vi elektis la duan, mi gratulas vin. Vi havas gramatikan intuicion, aŭ gramatikan kulturon. Zamenhof rekomendis la duan.

Kial, pli korekta estas la dua? Ĉar, principe, prepozicio estas uzata antaŭ nomo aŭ pronomo, t.e., antaŭ substantivo, por rilatigi ĝin al alia substantivo. Kial, la unua estas ankaŭ akceptebla?

Ĉar, malstrikte, infinitivo estas verba nomo aŭ pronomo. Strikte, post **sen**, prepozicio, ni devus morfologie substantivigi la infinitivon, kaj diri **sen scio**, kiel en angla: **without knowing** aŭ **without the knowiege**, ne **without know.**

Jes, larĝe, ne mallarĝe, komprenu: vi erarus se vi kredus, ke lingvo estas kunmetado de solidoj, ke vortoj estas statikaĵoj, ke lingveroj estas geometriaĵoj; lingvo estas reflektado de vivo kaj psikologio, de sentado kaj pensado, homa naturo. Simetrio, ekz-e, ne ekzistas ĉe niaj korpoj: ambaŭ miaj okuloj estas diferencaj, kiel inter si diferencas la du viaj, ĉu oreloj, ŝultroj, brakoj, vangoj, genuoj, aŭ kruroj. La granda originaleco de la genia arkitekto Gaudi konsistis en lia malakcepto de la geometrieco ĉe konstruaĵoj: ĉio diferencas en la naturo, ĉu forme, ĉu mezure. Lingvo responda al logiko de aritmetiko aŭ geometrio povus esti ia kodo; sed, vera lingvo povas respondi nur al lingva logiko, al lingvistiko, ne al matematiko. Vivanta lingvo estas funkciado, movado, fluado en kiu. do, semantiko kaj gramatiko estas senlimaj; ĉiuj lingveroj estas elastaj, fluaj, kaj tial, malgraŭ ke prepozicio, principe, postulas post si nomon aŭ pronomon oni ne povas malakcepti la frazon **por manĝi, oni bezonas manĝaĵon;** sed oni povas preferi **por manĝo, por manĝado, oni bezonas manĝaĵon.**

Jam Aristotelo iel difinis la prepozician kategorion, sed iel konfuze rilate al la konjunkcia. Tra la latina lingvo, la diferenco fariĝis pli klara, kaj R. Lenz ankoraŭ pli precizigis ĝin. Sed ĉiam nur pli kaj pli - neniam absolute. Nenio estas absoluta por ni en la mondo, krom la mondo.

Kompreneble, multkaze la prepozicioj estas tiel kategoriaj kiel en **«sur la tablo estas la libro, kiun mi ricevis «de» Petro kaj sendos «al» Jozefo.**

II. — KONJUNKCIO

Kaj, sed, aŭ, kvankam, ke, se...

La funkcio de konjunkcio konsistas en kunligo de vortoj, prepozicioj, frazoj: **«krajono «kaj» papero; ĝi ne estas utila, «sed» malutila; li volas vidi monton «aŭ» maron; mi malmulte lernas «kvankam» mi multe studas; ni pensas «ke» la mondo mirinde funkcias; tri «aŭ» kvar samideanoj interparolas en la apuda ĉambro; «se» pluvos, mi restos hejme**, k.c.

Ni vidas, ke la propozicio **mi restos hejme** dependas de **«se» pluvos;** ke la konjunkcio **se** subordigas prepozicion; kaj ke **krajono «kaj» papero**, fare de la konjunkcio **kaj**, kunordigas la propoziciojn; ekz-e: **krajono (estas utila) «kaj» papero (estas utila)**. Tial, oni difinas ke konjunkcio, estas lingvero, kiu kunligas propoziciojn ĉu kunordige ĉu subordige. Kontraŭe, prepozicio ne kunordigas aŭ subordigas propoziciojn, sed rilatigas nomojn: **pano «kun» butero, vino «en» botelo, krajono «sur» papero.** Atentu kiel oni povas diri **Petro salutas Johanon** aŭ **Petro salutas al Johano.** ĉar la rilatigo inter P. kaj J. povas esti esprimata per la prepozicio **al**. Sed ni me povas eviti la akuzativon fare de konjunkcio: **mi pli ofte vidas Petron «ol» Johanon**, ĉar la konjunkcio **ol** nur kunligas la propoziciojn **mi vidas Petron** kaj **mi vidas Johanon**, sed ne rilatigas ambaŭ nomojn. Jen ankoraŭ pli simple: **mi salutas Petron kaj Johanon:** la konjunkcio **kaj** nun kunordigas la prepoziciojn **mi satutas Petron** kaj **mi salutas Johanon**. Sed ĉe **mi salutas «al» Johano**, la prepozicio **al** esprimas rilaton inter Petro aŭ Johano kaj mi.

Tamen, foje proksimiĝas la funkcioj de prepozicio kaj konjunkcio ĝis identigo aŭ konfuzigo: **krom li, mi vidis neniun— krom lin, mi vidis neniun; mi diros al vi nenion alian krom** plej pura vero — mi diros al vi nenion alian krom plej puran veron. Ĉu tiu **krom** funkcias prepozicie aŭ konjunkcie? **Mi pritraktas gramatikon prefere al io alia — mi salutas «al» Johano**, la prepozicio **al** esprimas ne semantike samas **prefere al** kaj **prefere ol**, la prepozicio kaj la konjunkcio.

Oni fine devas kompreni, ke lingvo estas funkciado, fluado, flugado. Tial la lingveroj apartenas al tiu kategorio aŭ al alia —aŭ ili estas interkategoriaj!

Delfí DALMAU

Membro de la Akademio de Esperanto.

NI RECENZAS

E. TUDELA FLORES. Diccionario elemental Español-Esperanto y Esperanto-Español. (16 x 12 cm. 72 pág.) Valencia 1963.

La meritplena kaj—de a Esperantistaro bone konata—Dro Tudela, denove aperas sur la verkista tereno kun tiu malgranda, sed utilega libreto.

Pri la ŝajna facileco tamen grandega malfacileco de la vortarverkado mi ne ripetos tion, kion mi jam diris okaze de la «Vocabulario Esperanto-Español» de la sama aŭtoro. La nuna estas trafa resumo de la unua.

Alloga, belaspekta, mirige pura de preseraroj—kio ñonorigas kaj la aŭtoron kaj la kompostistojn—ĝi enhavas sufiĉe ampleksan vortnombron por la ĉiutaga bezonaĵo. Principe, same en la Esperanta kaj en la Hispana parto, al ĉiu vorto korespondas nur alia vorto, sed tiel bone elektitaj, ke oni trovas la tradukon de tute novaj ideoj (gamberro, television, fuselaje...)

Kompreneble, la plursencaj vortoj havas la koncernajn tradukojn ekz: Curiosa (scivolema, purega, kurioza), Errar (vagi, erari, maltrafi...)

La nuntempaj pedagogoj konsilas ke la lernantoj posedu kaj uzu la vortaron ekde la unuaj lernejaj gradoj. Se tio necesas por la gepatra lingvo des pli por la studantoj de alia lingvo. Vortaro devas esti la ĉiama kunulo de ĉiu klera homo, de la lernanto, de la vojaĝanto, ĉar eĉ la plej lerta, okaze, trovas nekonatan vorton aŭ forgesas ĝustan ideon.

Tiu vortareto plene plenumas tian bezonon. Ĝia formato, ĝia maldikeco permesas ĝin porti, senĝene, en la poŝo aŭ en la mansako.

La maturaj esperantistoj havu plej ampleksan vortaron sur sia labortablo; sed ĉiuj, novaj kaj malnovaj, veteranoj kaj freŝebakitaj, ni kunportu ĉiam tiun novan eldonaĵon, kiun mi ne hezitas varme rekomendi al la legantoj.

La Esperantistaro ŝuldas ankoraŭ al D-ro Tudela unu tutmeritan laboraĵon.

A. NUÑEZ DUBÚS

FANTAZIAJ NOSTALGIOJ

En belvazo el arĝento,
velkiĝinte ĉarma flor'
detranĉita el rozujo,
tiel ĝemis kun dolor':
—Kial mi, en riĉa vazo
kaj ne mi ĉe mia ter'?
Mi preferas mian branĉon
ol la luks' inter arĝent'.
Akvo ŝprucis el fonteto,
kaj pro ĝojo svarmis ĝi;
troviĝanta en libero,
kante kuris al la viv'.
Sed ĝi venis al la maro
en momento de malord'
kaj ŝanĝiĝis la svarmĝojo
en plend' trista, kontraŭ rok'.

En karcer', en ora kaĝo,
plektis kanton kanari',
sed, ĉar ĝi estis fermita,
plorlamente sonis ĝi:
—Oni kantas, iam ĝoje;
foje, ankaŭ, dum sufer',
kaj la birdo penis kanti
nostalgie, pri liber'.

—Ĉu la rozo vere ĝemis?
—Ĉu akvoplend' estis ver'?
—Ĉu la birdo, ĝi lamentis
aŭ nur febris mia rev'?
—Floro estis, sed ne ĝemis;
—Svarmis akv', pro iluzi';
—Birdo kantis ian temon,
—Sed, nur estis... fantazi'!

M. DE ELEZCANO,-Bilbao

Al idioma internacional: ESPERANTO

Tu nombre representa la esperanza
de un camino de paz y de progreso;
es por ello que te ofrezco mi alabanza,
y en estos versos míos te lo expreso.
Eres la lengua por tantos soñada:
fantástica creación de un genio ardiente.
Contigo las distancias no son nada;
los límites son algo inexistente.

El verde de tu estrella es nuestra guía
en todos los rincones de la tierra.
No sabes del rencor, ni de la guerra
deseas el estruendo y la porfía.
Por medio de tu empleo continuado
por fin la comprensión se ha logrado.

DIEGO SELSO

La ĝentileco kaj majstreco de nia bona amiko Saldanha Carreira, el Lisbono, regalas nin per la bela traduko de la delikata poeziaĵo de Andrieux

LA BONTÉ

Andrieux 1755-1824

Vivre en soi ce n'est rien,
il faut vivre en autrui.
Á qui puis-je être utile,
agréable aujourd'hui?
Voilà chaque matin
ce qu'il faudrait se dire
et le soir, quand des cieux
la clarté se retire,
heureux à qui son coeur
tout bas a répondu:
Ce jour qui va finir,
je ne l'ai pas perdu.
Grâce à mes soins, j'ai vu
sur une face humaine
la trace d'un plaisir
ou l'oubli d'une peine.

LA BONECO

Saldanha Carreira 1887-1997 (?)

Ne pensi nur pri si;
sin doni al aliaj.
—Ĉu povos mi utili,
ĉu faroj simpatiaj?
Jen kiel ĉiutage
la diro iĝos normo,
tuj de la mateniĝo
ĝis la vespera dormo.
Feliĉa, se la koro
vin flustru ĝojekscita:
—La tago, kiu svenas,
ne kredu ĝin perdita.
Pro niaj bonaj zorgoj,
mi legis en mieno
la venon de plezuro
aŭ iron de ĉagreno.

(Originalo de ANDRIEUX, konstanta Sekretario de la Franca Akademio)

NI FUNEBRAS

La 14n de Februaro mortis en Bargemon (Francujo) Frederic Pujolá Vallés, advokato, verkisto, publicisto; li naskiĝis en Palamós en 1877 kaj li esperantiĝis en la jaro 1905, kaj tuj li staris unuaplane en la tiutempa E-movado en Barcelona, kie li havis reliefan personecon en la rondoj politikaj kaj intelektaj. Li enblovis fortan kaj pozitivan entuziasmon en la tiutempan komencan epokon de Esperanto, kies rezulto kondukis al la organizo de la V.ª Universala Kongreso de Esperanto en Barcelona, en la jaro 1909, sub la plena protekto kaj simpatio de la aŭtoritatuloj, kaj kun la sincera kaj spontana aliĝo de la popolo mem, kiu fervore aplaŭdis surstrate la aperon de la eta figuro de la Majstro.

Lia laboro kiel prezidanto de la organiza komitato de la 5.ª U. K estis tre ampleksa, kaj ĝis la jaro 1914, li ne ĉesis esti la plej videbla pioniro de la esperanta movado en sia lando.

Pro politikaj kaŭzoj, en la jaro 1914, li estis akirinta la francan civitanecon, kio devigis lin partropreni la mititon, kaj resti dum 4 jaroj en la tranĉeoj. Kvamkam li, en kelkaj okazoj, manifestis al la postmilitaj esperantistoj en Barcelona, ke li timis esti perdinta, inter la koto de la tranĉeoj, sian antaŭan fidon por Esperanto, neniam mankis al tiuj lia persona helpo kaj kunlaboro por iu ajn entrepreno.

Jam 75-jara, li denove sentas esperantisman reviglîĝon. Kio duonmortis pro la unua milito, renaskiĝas post la fino de la dua, en 1946. Li kunvokis la malnovajn pionirojn kaj starigis rondeton en kafejo Salono Rosa, kaj, el tie, eliros la planojn por reflamigi la cindrojn de la movado. Li vere ĝuis, kiel vera avo vidinte kreski la infanon. Nun, li denove akiris la unuatempan fidon, kaj tute malkaŝe diris ke la plej feliĉaj jaroj de e perantisto estas la unuaj kaj la lastaj.

Li multe propagandis, skribis, tradukis, instruis kaj kuraĝigis la disvolviĝon de la lingvo internacia; li ebligis la prezentadon de «Misteri de Dolor» de la eminenta dramisto Gual, dum la V.ª Kongreso.

Lastatempe, okaze de la XII.ª Hispana Kongreso de Esperanto, en Tarrasa, li, tre elokvente, alparolis la kongresanojn. La maljuna leono ankoraŭ tondris:

La katalunaj esperantistoj multon ŝuldas al la malaperinta pioniro, kaj lia entuziasmo kaj persisto estu ekzemplo por ni ĉiuj. Ĝis antaŭ malmulta tempo, li loĝis en Barcelona, en la kvartalo Gracia, proksime de la grupo Stelo de Paco, kies komencajn paŝojn li tiel diligente akompanis. Nun, la neŝanĝeblaj okazintaĵoj transloĝigis lin al Francujo, apud sia filo kaj tie li ellasis la lastan elspiron, ne malproksime de la militaj kampoj, kie en malproksimaj jaroj li defendis sin «de la puloj, la koto kaj la germanaj obusoj...»

Ke, fine, la Paco estu en vi, kara Pujolá!

EDCA

La 15n de Februaro forpasis nia kara amiko kaj samideano Filiberto García Hurtado. Poŝtestro de Badalona (Barcelono). Li ĉiam kaj vigle propagandis nian ligvon kaj ideon, ĉeestis multajn kongresojn kaj kaptis la simpation kaj amikecon de ĉiuj. Ni ĉiam rememoros lin kaj ni kondolencas lian estimatan fami ion.

GRAMATICA, EJERCICIOS
Y
DICCIONARIO de ESPERANTO
por
JOSE ANGLADA PRIOR
Edición ampliada
164 páginas, 40 pesetas
Se ha hecho una tirada especial de la ampliación (Suplemento)
precio 12 pesetas
para atender a los que poseen la edición anterior
Gastos de envío aparte
Pago anticipado o a reembolso
Pedidos a la FEDERACION
o al autor
Sitjas, 3, pral. 1.ª - BARCELONA (I)

PARA NUESTRO BOLETIN

Donativos recibidos desde Agosto a Diciembre de 1962

		Pésetas
	Suma anterior	3.827
F. Abella	Barcelona	25
L. A. Ramírez	Huete	15
F. Mezquida	Denia	25
J. Arroyo	Los Barreros	13
M. Ruiz	Madrid	15
R. Vizcaíno	Valencia	30
E. Capdevila	Valencia	50
J. Anglada	Barcelona	50
E. Costa	Sardanyola	15
F. Parra	Valencia	10
H. J Ceretti	Argentina	15
J. M. Altadill	Gandesa	10
M. Buscató	Barcelona	80
V. Marín	Barcelona	80
M. Alamo	Baíverde	15
L. A. Ramírez	Huete	41
A. Jiménez	Castellón	15
R. Ricou	Santa Eugenia Ter	10
S. Vidal	Barcelona	40
P. Naranjo	Jerez	27
A. Criach	Sabadell	240
C. Tranque	Valladolid	25
S. Alberich	Barcelona	40
J. Roig	Barcelona	40
J. Flaquer	Barcelona	40
F. Alsina	Barcelona	40
M. Alsina	Barcelona	10
R. Cortijo	Lérida	40
C. de la Cueva	Madrid	40
J. Aulina	Bañolas	20
A. Grau	Tabernes Valldigna	60
P. Alcedo	Bilbao	10
J. Figueras	S. Esteban de Bas	65
S Magriá	Barcelona	25
R. Palacios	Bilbao	15
F. Santacruz	Barcelona	15
L. Serrano	Sabadell	10
J Juan	Valencia	40
J. Devis	Valencia	40
	Suma total de 1962	5.173

Tre koran dankon al ĉiuj donacintoj.

NUESTROS SOCIOS PROTECTORES

Lista final de 1962

Instituto de Esperanto		Barcelona
Doktoro Dianthus		Lérida
D. José López		Cullera
D. Vicente Santamaría		Valencia
D. Miguel Manteca	(1963)	Madrid
D. Deifí Dalmau	id.	Barcelona
D. Antonio Pastor	id.	Bilbao
D. Vicente Marín	id.	Barcelona
D. Jaime Herp	id.	Barcelona
D. Carlos Belzer	id.	Venezuela
D. José Hernández	id.	Barcelona
D. Antonio Criach	id.	Sabadell
D.º Antonia Galbany	id.	Sabadell
D.ª Pepita de Caspary	id.	Noruega
Grupo Fido kaj Espero	id.	Valladolid
D. Salvador Oliván	id.	El Ferrol C.
D. Ramón B. Calvo	id.	Guia
D. Feliciano Martín	id.	Madrid

FERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28 - VALENCIA

PREMIO «COMELLA-BASOLS»

KVINA KONKURSO

Oni donacos 2.000 pesetojn por la plej bona gaja rakonto en Esperanto

Ĝeneraloj reguloj

1.ª—La konkursaĵoj havu la amplekson de po 2000-3000 vortoj.

2.ª—La konkursaĵoj nepre estu maŝinskribitaj, kaj oni sendu 4 ekzemplerojn.

3.ª—Oni skribu sur ĉiu rakonto pseŭdonimon por kaŝi la identecon de Faŭtoro, kaj —en aparta koverto—sian nomon kaj adreson knne kun la pseŭdonimo.

4.ª—La Juĝanta Komisiono, laŭ testamento de Sro Jacint Comella (kreinto de la Premio) konsistas el eksterlandaj samideanoj, membroj de U. E. A. kune kun katalunaj juĝantoj.

5.ª—La konkursa kotizo, por unu aŭ pluraj rakontoj, estas 10 pesetoj por Hispanio, kaj 4 steloj por eksterlando, (aŭ 3 respondkuponoj). Por landoj kie ne estas eblo sendi la kotizon, la partopreno estas senpaga.

6.ª—Kiam publikiĝos la Verdikto, samtempe estos sciigata la koncerna Juĝantaro.

7.ª—La limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 31.ª de Julio de 1963.

Oni sendu ĉion laŭ la jena rekomendo:
Por la Konkurso «Comella-Basols».
Sro. Francesc Vilá.—Sekretario.—Instituto de Esperanto, Strato Montcada, 12. Barcelona (3) Hispanio.

DICCIONARIO ELEMENTAL
Español - Esperanto
y
Esperanto - Español
Precio 50 Ptas.
Pedidos al autor: **Dr. E. TUDELA**
Ruzafa, 41 VALENCIA

Depósito Legal V 304-1959

Lastmomente, kiam la ĉemetita numero de BOLETIN estas jam for de preso, trafas al ni malĝojiga okazaĵo:

Hodiaŭ, 15a de novembro 1963a

Nia altestimata samideano kaj denaska esperantisto,

DON RAFAEL GASTON BURILLO

Mortis subite, post kelkhora malsano je la aĝo de 55 jaroj.

Brila oratoro, prestiĝa advokato, fervora kaj multkapabla Esperantisto, membro de konata kaj estimata familio de malnova kaj profunde enradikiĝinta Esperantisteco, estis fidela kaj inda heredanto de la Esperantistaj idealoj enkarniĝintaj en sia patro, jam mortinta, Dn. Emilio Gastón Ugarte, fondinto de la Zaragoza Societo Frateco, kaj konata en la ne- kaj Esperantista mondo pro sia laboro en la sukcesigo de la Aŭstria infanhelpo.

Al ties familio, kaj kun speciala emocio al niaj karaj kunlaborantoj, fraŭlino Inés Gastón Burillo (sekretariino de H.E.F.), kaj Emilio Gastón Sanz (membro de la redakcia komitato), ni esprimas nian plej sinceran kaj elkoran kondolencon.